

Tute renovigita atendas vin edukado.net

Komence de 2009 evidentiĝis ke la tiam 8-jara porinstruista retejo ne plu povos funkcii, se ĝi ne estos rekonstruita kaj transmitita al alia, prefere esperantista servilo. La necesan sumon de 35 mil eŭroj por rekrei ĝin tre moderna kaj ampleksa rekordtempe kunmetis la 15 sponsoroj kaj 220 membroj de la retejo. Post 14-monata konstrulaboro ĝi en nova kostumo kaj kun efikaj kaj utilaj servoj atendas siajn uzantojn.



La 3-an de oktobro 2010 estis lanĉita kun virtuala festo la rekonstruita porinstruista retejo *www.edukado.net*. La unuan horon de la lanĉo ĉeestis rete trideko da esperantistoj, kiuj premiere povis admiri la renaskiĝintan paĝaron. La tiamaj kaj postaj vizitantaj membroj estis mirigitaj pro la freŝa aspekto, travidebla strukturo, novaj ebloj kaj facila uzo de la paĝaro. Ekde tiam kvardek procentoj de ili regule revenas kaj esploras la paĝaron kaj kunĝojas pro la sukceso kaj ekposedo de tiom moderna helpilo por la instruista laboro. Por ilustration jen du ciferoj: la registritaj uzantoj estas pli ol 2200 kaj en la pasintaj 5 jaroj la ekzercoelŭuto superis 120 milojn.

La paĝaro ne nur teknike renoviĝis, sed ekhavis ankaŭ tutnovajn sekciojn. Elstaras el ili la mondmapo de membroj kaj alia mapo de la Kursejo (kun movadaj kaj lernejoj kaj kursgvidantoj), t.e. guglo-mapo, sur kiu per diverskoloraj piktogramoj estas markitaj la koncernaj lokoj. Tiel la vizitantoj facile povas trovi kursinformojn laŭ geografiaj lokoj.

Grandan sukceson havas, krom la kolekto de eldonitaj lerniloj, lernolibroj kaj uzpretaj ekzercomaterialoj, la Panteono de la meritplenaj instruistoj de Esperanto, por kiu la redaktejo

atendas proponojn kaj materialojn pri forpasintaj kaj vivantaj eminentaj kaj primemorendaj instruistoj.

Sciencajn celojn servas alia nova parto, la sekcio **Diplomlaboraĵoj**, kien ni alŭtatas la grandan kolekto-laboron de Edward Symoens; nome detalajn informojn pri la pli ol cento da universitataj kaj altlernejaj diplomlaboraĵoj, verkitaj en Esperanto aŭ en ajna lingvo pri esperantologio aŭ interlingvistika temo. Lia kolekto koncernas verkojn el la periodo de la jaroj 1906 ĝis 1993. En tiu laboro aktive helpas la filino de s-ro Symoens, kiu feliĉas iel kontribui kaj daŭrigi la laboron de sia patro.

Aldone, por la enretigo de la verkoj, pretigitaj en la lastaj dudek jaroj, la aŭtoroj estis petataj en mesaĝoj kaj tra aliaj forumoj. La bibliografiajn informojn – kiam eblas – ĉefe ĉe la novaj verkoj, kompletigos elŭteblaj aldonajoj, la laboraĵoj mem, iliaj resumoj aŭ recenzoj. Per tio la retejo donos riĉan materialon por esploristoj kaj studentoj estonte verkantaj pri esperantologiaj kaj interlingvistikaj temoj.

La paĝaro havas ankoraŭ dudekon da aliaj funkcioj, malfacile prezentebly en mallonga raporto. Pli valoras vizito kaj krosado sur maro da paĝoj (plurdek miloj) de la jam 9-jara kolekto. La retejo estis rekonstruita laŭ la planoj de la redaktoro kaj realigita de la kompetenta kaj subtenema programisto Jevgenij Gaus. La brila rezulto ne estus atingebla sen la subteno de ESF, plie sen malavara helpo de deko da grandaj sponsoroj kaj 220 individuaj donacintoj.

Grandan dankon por ĉiuj, kiuj fidis al la projekto kaj helpis en la rekonstruo de la retejo.

Venu, vizitu kaj ĝuu la riĉecon de la plej moderna kaj riĉa faka retejo de Esperantujo.

Atendas vin *www.edukado.net* kaj ĝia redaktoro

Katalin Kováts

